# INTERNI

**estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth, Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).**

**Numero 206** **Junio 2003**

**Laborantoj:**

**Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto**
**Stevens Norvell — kompostisto**
**Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto**


**Sendu leterojn kaj artikolojn al:**
**Bob Williamson**
**329 Poplar Drive**
**Dartmouth, Nova Scotia**
**KANADO B2W 4K8**
**bob.williamson@ns.sympatico.ca**

**Sendu abon-monon al:**
**Reni Porter**
**71 RidgeValley Road**
**Halifax, Nova Scotia**
**KANADO B3P 2E5**


**Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15**


## OKEMO TRANSLOKIĜU AL KANADO

**Fare de Yves Bellefeuille**

Mi naskiĝis en Cornwall, en Ontario, unu kilometron for de Usono, kaj ofte estis en tiu lando. Sed nun mi neniam plu volas iri al Usono.

Mi timas Usonon; mi timas esti en Usono. Usono nun estas tia lando kie oni povas esti en malliberejo dum jaroj, sen akuzo, sen la rajto paroli kun advokato, kaj sen la rajto vidi diplomatian reprezentanton se oni estas eksterlandano.

Mi pensas pri Maher Arar (1) el Otavo, mia urbo. Li vojaĝis de Tunizio al Montrealo. Li havis sian kanadan pasporton. Malbonŝance li transitis la flug-havenon Kennedy, en Nov-Jorko. Usono kaptis lin kaj elĵetis lin en Sirion, tiu sama lando kiun ĝi nun nomas "bandita lando" kaj "terorisma ŝtato". Almenaŭ oni pensas ke tiel okazis, ĉar Usono ne volas diri kie li nun estas. Oni ne plu havas novaĵojn de li. Amnestio Internacia nun konsideras ke li estas inter tiaj homoj pri kiuj policistoj interesiĝis kaj kiuj poste "malaperis".

Mi pensas ankaŭ pri Liban Hussein (2), ankaŭ el Otavo. Dufoje tage mi veturas antaŭ lia vendejo, kiu situas survoje al mia laborejo. Laŭ peto de Usono, Kanado akuzis lin pri tio, ke li kolektis kaj donis monon por terorismaj celoj. Post $ 150 000 da advokataj kostoj, juĝisto decidis ke estis absolute neniu pruvo pri tio. Almenaŭ li rajtis al decido de juĝisto.

Usono ne plu volas agnoski la Konvenciojn de Ĝenevo. Ĝi eĉ ne plu volas agnoski siajn proprajn leĝojn kaj malliberigas homojn eksterlande por eviti ilin.

La kontaktoj inter la kanada kaj la usona movadoj estas surprize maloftaj. Normand Fleury el Montrealo havis vere bonan ideon kiam li sugestis, antaŭ deko

da jaroj, ke okazu komunaj renkontiĝoj en Okemo, en Vermonto. La loko estas konvena por esperantistoj el Nov-Jorko, Montrealo, Otavo, kaj aliaj lokoj. Krome Normando zorge elektis daton kiu konvenas al kanadanoj kaj usonanoj, ĉar ĝi okazas dum longa semajnfino en ambaŭ landoj – la dank-festa semajnfino ĉe ni, kaj la Kolumbo-festo en Usono. Mi iris al Okemo kaj ĝuis la renkontiĝon, kaj mi rekomendis al aliaj homoj ke ili ankaŭ ĉeestu ĝin.

Sed mi ne plu volas iri al Okemo, kaj mi ankaŭ ne plu povas varbi aliajn esperantistojn ke ili iru tien. Kiel mi povas diri al samideano kaj samŝtatano ke li iru al Usono, sciante ke tiu lando tute malkaŝe diskriminacios kontraŭ li pro la loko kie li hazarde naskiĝis? Kiel mi povas inviti esperantiston kiu hazarde naskiĝis en Libano aŭ Egipto ke li iru al Usono, sciante ke homoj kiel li tuj iris en malliberejon kiam ili provis obei al usona leĝo kaj registriĝi ĉe policejo?

La komuna kanada-usona renkontiĝo ne plu povas okazi en Okemo. Venis la tempo ke ĝi translokiĝu al alia el la partneraj landoj.

**Redaktora noto: Yves Bellefeuille validigas siajn opiniojn per la jenaj anglalingvaj artikoloj:**

**1. "INS Deports Canadian Citizen to Syria" (INS elpelas kanadan civitanon al Sirio), USA Daily: <http://www.usadaily.com/News%20Stories/021028_iins_deports_canadian_citizen_to.htm>**

**1. "Possible 'disappearance'/ forcible return" (Ebla 'malaperigo'/deviga reveno), Amnestio Internacia (21 oktobro 2002): <http://takeaction.amnestyusa.org/action/moreinfo.asp?item=2248> (ne plu trovebla)**

**2. CANADA HALTS EXTRADITION PROCESS, LIBAN HUSSEIN DE-LISTED (Kanado haltas transdonan proceson, Liban Hussein mallistigita), Kanada Departemento de Justico (3 junio 2002): <http://canada.justice.gc.ca/en/news/nr/2002/doc_30513.html>**

**2. "Victims after the attacks" (Viktimoj post la atakoj), CANOE.ca (Kanuo) (5 septembro 2002): <http://cnews.canoe.ca/CNEWSSept11/sep5_victims-sun.html>**

## GRATUL-MESAĜON

Gratulon pro 17 plenaj jaroj de "Inter Ni" kaj ĉefe pro ĝia enhavo. Certe bona enhavo por festi bonan okazintaĵon! Mi neniam antaŭe legis la popolfabelon "La Supŝtono" kaj ĝuis la humuron. Ankaŭ estas bona konsilo de Steĉjo.

Kore,

Ed Harler

# KAPĜIRA DEMANDO

**Estimata Redaktora Moŝto:**

**En mia urbo estas granda trafikcirklo, tre plenplena de aŭtomobiloj, kamionoj, ktp. Dum multaj jaroj mi evitis tiun trafikcirklon, ĉar estis ĉiam tiom da aŭtoj, bruo, konfuzo, eĉ akcidentoj, kaj mi timis. Lastatempe mi eltrovis, ke mi fakte povas rondveturi en vojcirklo en mia malnova aŭteto, se mi havas grandan kuraĝon kaj ne pensas pri la danĝero. Nun mi komencas ĝui la defion, eĉ sentas ĝojon pro la vigligo de la sperto. Post sukcesoplena ĉirkaŭo mi sentas la adrenalinon en la sango. Estas kvazaŭ ludo, eĉ pli bona ol komputilaj ludoj. Mi nur malatentas la grincon de la bremsoj, la hupadon, ankaŭ la pugnojn kiujn montras kelkaj neĝentilaj veturistoj. Mi konfesas, ke mi kelkfoje ĉirkaŭis duafoje por pli longe ĝui la defion kaj la stimuladon.**

**Do, mia demando estas: ĉu estas leĝa limo, kiomfoje oni rajtas ĉirkaŭi la trafikcirklon sen eliri?**

**Mi senspire atendas vian respondon.**

**Kon Fu Zita**

Estimata Kon Fu,

Multan dankon pro la kapĝira demando. Mi multe esperas, ke vi ne atendadis ĉi tiun respondon daŭre ĉirkaŭveturante aŭ evitante la trafikcirklon.

Aŭdinte la demandon, mia edzino respondis: "unu fojon malpli ol tiomfoje, kiom necesas por senti kapturnon", kaj fakte tio ne estas malbona respondo. Efektive, mi ne certis pri la reguloj pri trafikcirkloj. Tamen, oni ne rajtas malkulpiĝi pro nescio de la leĝo. Tial mi telefone enketis ĉe via provinca departemento de trafiko. Helpemulino klarigis al mi, ke preciza maksimuma nombro da ĉirkaŭ-veturoj ne troviĝas en la regularo, kiun ŝi laŭtlegis al mi. Kompreneble, se oni maltrafas la deziratan elir-vojon, oni rajtas daŭriigi veturon ĉirkaŭ la trafikcirklo por havi alian oportunon. Tiun regulon oni povas legi en la provinca Leĝo pri MotorVeturiloj.

Aliflanke, ekzistas en la sama Leĝo la regulo kiu postulas prudentan konduk-manieron laŭ tiuj cirkonstancoj aŭ kondiĉoj de la strato kiuj ekzistas precize tiam, kiam oni alvenas (el la latina lingvo oni prunteprenis la esprimon "prima facie", t.e. unuavide). Laŭ tiu regulo, oni rajtas veturi ie ajn nur tiom fore, aŭ eĉ ĉirkaŭ trafikcirklo nur tiomfoje, kiom oni kapablas sub la tiamaj kondiĉoj en maniero sendanĝera al si mem kaj al aliaj homoj.

Nun la demando fariĝas: Kiel oni povas taksi la kondiĉojn kiuj ekzistas kiam oni veturas en trafikcirklo, kaj ĉu estas kondiĉoj kiuj limigas la nombron de ĉirkaŭ-veturoj? Jen kelkaj indikiloj kiuj povus helpi vin:

— Kompreneble, la vetero ludas grandan rolon en via decido. Ju pli da glacio, neĝo aŭ pluvakvo troviĝas sur la strato kaj ju malpli da lumo ekzistas, des pli danĝera estas la trapaso, kaj en tiaj kondiĉoj oni devus limigi la nombron da ĉirkaŭveturoj kiom eble plej multe. Eĉ dum sunbrilaj matenoj, oni supozeble turnas sin sufiĉe multe dum unu rondveturo por iam trovi blindigan sunlumon en la okuloj.

— Ankaŭ gravas la propra sanstato. Kiel jam dirite, se vi eksentas kapturnon, vi devas tuj eliri trafikcirklon, eĉ ĉe la malĝusta elirejo. Efektive ne gravas kie vi estas, se vi sentas kapturnon vi devus halti en sekura loko – ne en la vojo kaj ne en la trafikcirklo – ĝis la malbona sento malaperas. Mi rekomendas promenon en la freŝa aero - eble hejmen por akiri krucvortenigmon por helpi pasigi la tempon ĝis la malbona sento malaperas.

— Ju pli da aliaj aŭtoj estas en la cirklo, des pli danĝera estas la vojaĝo. La plej sendanĝera maniero inter multaj aŭtoj – kio ĉiam senkulpigos vin – estas eviti aŭ eliri la trafikcirklon kiom eble plej rapide kaj sendanĝere.

— Veturado ne devas esti anstataŭo al drogo; mi konsilas fortan tason da kafo tuj antaŭ ol vi eniras trafikcirklon. Tiele vi ne tiom bezonos la senton de adrenalino en la sango, ĉar vi jam anstataŭigas ĝin per kafeino. Oni facile povas trovi traveturèblajn kaf-butikojn laŭ distancoj de kelkaj metroj sur la stratoj de via urbo. Kial ne aĉeti ankaŭ sukerpasteĉon por manĝi, por ke vi ne svenu pro malsato sur la vojo? Tio estas bone konata tekniko de la polico.

Fine, se vi trovas vin en trafikcirklo parolanta per portebla telefono, trinkanta tason da kafo, manĝanta kuketon kaj eble ankaŭ respondanta al mesaĝilo dum vi rapidumas por eviti la transirantojn ... tiam mi konsilas al vi limigi tiomfoje vi rondveturas sur la trafikcirklo sen eliri.

Sendanĝeran veturadon deziras al vi

la redaktoro

## Pensetoj

**- Kiu laste ridas, tiu pensas plej malrapide.**

**- Tago sen sunbrilo estas kiel... nu, kiel nokto.**

**- Sonigu la hupon se vi amas trankvilon kaj kvieton.**

**- Nenio estas idiot-imuna al sufiĉe talenta idioto.**

☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺